

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



**Nina
Vinnikova**
[NOVOALTAJSK,
Ruslando]

2000

redakcie — literatur-historiaj paĝoj — unu reala historio
aforismoj — ho, juna Brazil' — fabloj — biciklo por ĉiam
neputritaj pensoj — liter-supoj — vortĉenoj — anekdotoj
korespondu! — Abonu KOMENCANTOn por 2001!

6

PERANTOJ de KOMENCANTO

laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton

ARGENTINO

Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

AŬSTRALIO

Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

BRITIO

Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

ĈEĤIO

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

DANIO

La Gazetoservo de Danio. Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

ESTONIO

Virve Ermits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

FRANCIO

- Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceresaie, 75004, Paris.

- R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

GERMANIO

Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

IRANO

Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

ITALIO

Itala Esperanto Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

ITALIO, KROATIO, SLOVENIO

Višnjja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

KUBO

Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

LITOVIO

Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

NORVEGIO

Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

POLLANDO

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

SVISLANDO

Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

USONO

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Proksimiĝas la fino de 2000. Baldaŭ startos 2001. La redakcio invitas vin vivi en la nova Jarcento nepre kun KOMENCANTO!

Sed dume en la Norda hemisfero regas aŭtuno kaj tion bone respiegulas originala desegnaĵo de Nina Vinnikova ĉe la kovrilo.

En la literatura parto vin atendas rakonto pri tiel nomata *franca skolo*. Henri Vallienne estas unu el la plej eminentaj aŭtoroj de tiu periodo.

Interesa rakonto de emerita milicia oficiro kaj eterna komencanto Viktor I. Djakov, Ruslando, el lia reala vivo

Por la unua fojo tiel bunte kaj amplekse furoras en nia revuo Brazilo - lando de eterna somero kaj kapablaj esperantistoj. Evandro de Frietas, Manoel Ramos Nogueira kaj Ivo Sanguinetti debutas sur niaj paĝoj.

Bill Thorne hodiaŭ furoras pri bicikloj. Fablo de argentina aŭtoro, tradukita de Yunier Cables Solis el Kubo kaj fablo, sendita de Rudolf Zoldoš el Jugoslavio. Tiu lasta debutas ĉinumere ankaŭ ĉe AFORISMOJ kaj ĉe ANEKDOTOJ.

Margarita Zujeva kun Neputritaj Pensoj, Y.C.Solis el Kubo kun Literosupo, Stanislav Kacko el Ruslando kaj Thomas Alexander el Usono klopodis vin distri ĉe la paĝo 10.

Tra la tuta kajero buntas grafikajoj de Eduard Ĥalilov, Bill Thorne, Nina Vinnikova, Jurij Perevalov, Maša Terjohina, Valerij Ĥabarov, Artur Ĥismatullin

Tradicias Anekdotoj, Korespondu!, kaj alvokoj pri la reabono por 2001!

AGRABLAN LEGADON!

Viaj DONACOJ por KOMENCANTO
estas ĉiam bonvenaj!

KOMENCANTO

2000 numero 6 / refundita en 1997/8 numeroj jare

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpoŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2000

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$11;

aŭ por ĉiuj — 15 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo kaj la rubla zono: 77 рублей

(за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el KOMENCANTO.

Sola kondiĉo - nepre menci KOMENCANTO'n kaj la nomojn de la aŭtoroj kun ties loĝlokoj.

Verkistoj de la 1-a literatura periodo (daŭrigo) La franca skolo

En antaŭaj numeroj ni jam konatigis vin kun tiel nomata slava influo dum la Unua Periodo de esperanta literaturo. Nun ni volas doni iom da atento kaj rakonti pri alia influo — la franca, kiu ankaŭ ludis gravan rolon en literaturaj tendencoj de tiu periodo.

La franca influo aliĝis al la slava post 1900, kiam aperis la fama franclingva *Komentario* pri la gramatiko de Esperanto, farita de *Louis de Beaufront*. Sed dekomence kelkaj vortoj por prezenti L. de Beaufront mem.

Louis de Beaufront estis la unua franca esperantisto, li naskiĝis la 3-an de oktobro 1855 en Parizo; al E-to li aliĝis jam en 1888 kaj tuj komencis propagandi ĝin. En 1892 li eldonis la unuan E-lernolibron por francoj. Krome L. de Beaufront estis konata kiel lingvisto, artikolisto kaj eminenta polemikisto. En la daŭro de kelkaj jaroj (1892-1905) li eldonis tutan serion da lernolibroj, vortaroj, ekzercaroj (en kiuj "klarigis la manieron de esprimo en bonstila Esperanto la naciajn parolturinojn, evitante la danĝeron de naciaj dialektoj"), supremenciitan *Komentaron* pri la E-gramatiko. L. de Beaufront enkondukis la unuajn Esperantajn ekzamenojn. En siaj publikaj polemikoj, artikoloj li alvokis esperantistojn al "logika" kaj "korekta" lingvo-uzo.

Ĝis la 1902-1905 la stilo de la francaj verkistoj dependis de la lingvaj konsiloj kaj respondoj, pretigitaj de Louis de Beaufront. Ili uzis la lingvon korekte, sed iom rigide, tro afiksoriĉe kaj refleksioble.

Post la fino de la influo de L. de Beaufront naskiĝis aliaj tendencoj. Unu franca skolo ĉirkaŭis E-gazeton "La Revuo" sub redaktado de Carlo Bourlet. Adeptoj de tiu skolo proponis lingvon malfermitan, riĉan, favoran al la multiĝo de neologismoj. Multflanka, moviĝema "La Revuo" estis atakata de la adeptoj de la alia skolo, kiu ĉirkaŭis la konservativan gazeton "Lingvo in-

ternacia", kiun tiutempe redaktis Théophile Cart. Cart kaj lia skolo rigore kontraŭis ĉion novan, bataladis kontraŭ ĉiu ŝanĝo en la lingvo. Ĉiama konsilo de Th. Cart estis "Ni fosu nian sulkon" kaj signifis "Ni laboru, restante fidelaj al nia sensanĝa fundamento".

Literature la franca periodo ne estis speciale fruktodona: partoprenis ne tiom multe da originalaj prozverkistoj. En 1905 aperis perinfana noveleto de Emile Boirac "Perdita kaj retrovita"; de lia licea fizikprofesoro Henri Sentis aperis la novelo "Urso" en 1906; en la novelaro "La Senlaca sinofero" en 1912 aperis kelkaj romantikecaj kaj iom naivaj noveloj de Jeanne Flourens sub pseŭdonimo Rokšana; Rene Beck verkis novelon "La Mistera Sinjorino" en 1913; de Claudius Colas aperis la kristnaska rakonto "La lingvoŝuoj" en 1914 kaj kelkaj aliaj.

Sed la franca periodo prezentis multajn lingvoesplorantojn, kiuj multe faris por la scienca prilaboro de la lingvo (Emile Boirac, Théophile Cart, Carlo Bourlet k.a.) Multiĝis ankaŭ la sciencaj verkistoj kaj fiksiĝis la Esperanta ĵurnalistaj lingvo.

Plej eminenta - almenaŭ kvante - aŭtoro de la franca periodo estis Henri Vallienne, tial kun lia literatura agado ni konatigas vin aparte.

Henri VALLIENNE

Henri Vallienne - franco, kuracisto, naskiĝis en 1854 en Saumur, mortis en 1908 en Malakoff (apud Parizo). Dum sia tuta vivo li multe interesiĝis pri literaturo. Lia opinio estis ke Esperanto venkos, nur se ĝi estos literatura. Kiam li ekkonis Esperanton en 1903, la literaturaj eblecoj de la lingvo entuziasmigis lin kaj li tuj ekuzis ĝin por tradukado de granda verko - "Eneido" de Virgilio: la du unuaj kantoj tradukitaj aperis en 1904. En 1905 H. Vallienne grave malsaniĝis: lin atakis kormalsano kaj post la krizo

li plu ne povis eliri el sia ĉambro, sed eĉ tiun "malliberecon" li uzis por akceli sian literaturan agadon. En 1906 aperis la plena traduko de "Eneido", en 1907 - la originala romano "Kastelo de Prelongo" kaj religiscienca verko "Evolucio de la Religia Ideo", en 1908 aperis lia dua romano "Ĉu li?" kaj traduko de "Manon Zescaut" de Prévost.

Vallienne redaktis ankaŭ propran broŝuron en esperanta kaj franca lingvoj "Por kaj kontraŭ Esperanto", kontribuis por multaj revuoj ("La Esperantisto", "La Revuo", "Scienca revuo", "Medicina revuo" k.a.).

Post lia morto en 1909 oni malkovris multajn neeldonitajn manuskriptojn de tradukadoj, inter ili: novelo de Musset "Margot", "Aventuroj de Telemako" de Fenelon, "Metamorfozoj" de Ovidio k.a.

En 1908 ĉe la konkurso organizita de la gazeto "La Revuo" Vallienne atingis la duan lokon inter la plej grandaj esperantlingvaj stilistoj.

Oni diverse taksis valoron de la literatura agado de Henri Vallienne: iuj karakterizis lian stilon kiel peza, malleganta (G. Waringhien ekzemple trovas ĉe li multe da "francismojn neakcepteblajn"), aliaj opiniis, "ke li sukcesis verki librojn simplajn kaj interesajn kvankam la temoj ne estas indaj je lia talento" (temis pri liaj originalaj romanoj).

Sed Vallienne estis la unua verkisto, kiu skribis originalajn romanojn en E-to, grandajn verkojn po 450-500 paĝoj, ĝis li neniam estis ankoraŭ skribitaj, kaj certe romanoj de Vallienne havis grandan propagandan valoron: ili pruvis, ke la artefarita lingvo taŭgas por esprimi kaj priskribi ĉiujn incidentojn de la ĉiutaga vivo. Malsupre la legantoj trovas malgrandan fragmenton de romano de H. Vallienne "Kastelo de Prelongo", kiu eble instigos trovi kaj tralegi ĉi tiun verkon plene kaj ekhavi propran opinion pri la literatura stilo de H. Vallienne.

Henri Vallienne

Kastelo de Arelongo

Iveninte en la lokon, montritan de la letero, ŝi haltigis sian ĉevalon, rigardis ĉirkaŭ si kaj avidis neniun. La kriadoj de babilemaj birdoj nur malkvietigis la silentadon de l'altaj arbega-roj.

Subite viro vestita kiel hakisto eliris el la malantaŭo de arbo. Elpreninte sian ĉapelon, li diris per tono de supera ĝentileco:

"Mi dankas vin, sinjorino, ĉar vi venis. Mi vin atendis konfide, estante certa, ke mi incitis vian scivolon".

Aŭdante la sonon de tiu voĉo, Matildo ek-tremis:

"Sed, sinjoro, ŝi diris, ŝajnas al mi, ke mi jam vidis vin ie... Viktor Linŝardo! Ŝi ekkriis per tono de neesprimebla teruro.

— Jes, sinjorino, la nepo de l' iama lakeo".

Parolante la junulo prenis per la brido la ĉevalon de dukino.

"Ĉar mi estas certa, ke vi estus malkonsentinta min akcepti en vian kastelon, se mi estus farinta peton pri tio laŭ regula maniero, mi estis devigita uzi tiun militan ruzon, pri kiu mi petegas de vi mian senkulpigon".

La komandanto parolis per ironia tono. Liaj gestoj prezentis tiun veluran dolĉecon de la kato ludanta kun la muso, kiun ĝi baldaŭ ek-mangos.

"Nu, sinjoro, kion vi petas.

— Unue ke vi malsupreniru. Tio estos pli oportuna por interparolado.

— Neniam, sinjoro".

Kaj la juna virino levis sian vipeton.

Ne timigite la filo Linŝardo eliris el sia poŝo malgrandan revolveron, kaj enmetis la tubon en la orelon de la ĉevalo.



...

Viktor Iliĉ Djakov [ROSSOŜ, Ruslando]



Mi dufoje ne ellernis Esperanton

En la loka ĵurnalo de Rosoŝanska distrikto de Voroneĵa regiono mi de 30.05.2000 mi traegis informon pri via (Ekaterinburga) senprofita klubo de Esperantistoj.

Mi deziras esti akceptita al la koresponda kurso pri lernado de gramatiko (kaj vort-aro) de Esperanto. Se tio eblas, mi petas akcepti min.

Mi dufoje ne eklernis Esperanton:

a) en 1938 jaro, en Voroneĵo nin, kelkajn knabojn-filatelitojn (mi tiam havis 12 jarojn), instruis volontula pedagogo el Moskvo Andreo Aleksandroviĉ, dum someraj ferioj, ĉe la bordo de rivero, donis hejmajn taskojn. Ni diligente lernis la bazajn elementojn de la lingvo.

Sed baldaŭ mia patrino, reveninte de la korto kun ŝnuro por sekigi lavaĵojn, ekmiris, ke mi dum la ferioj laboras kun kajeroj. Ŝi demandis min kaj kun pala vizaĝo komencis bati min per la ŝnuro kaj paroladi: "Ne sufiĉas por vi, ke oni arestis la patron *pro kontraŭstaro*, sed vi volas ankoraŭ, ke oni prizonigu nin ambaŭ pro spionado..." Certe ŝi miajn kajerojn disŝiris kaj en rubujon forĵetis.

Proksimume post unu semajno venis al ni, kvazaŭ malnova konato de la patrino, agrable vestita viro en civila kostumo, iom babilis pri nenio kaj kvazaŭ ŝajne pri mia nova "hobio". Li kun profund-pensa mieno diris: "Mi traktas vian Esperanton kiel afero malbona. Okupu vin prefere pri io utila — sporto aŭ aviamodelismo". La konversacio finiĝis, oni eĉ ne postulis de mi la "noblan ĵuron".

b) post 50 jaroj. Laŭ la ĵurnala informo en "Sovetskaja Rossija" mi aliĝis al moskva klubo "Kopso" al koresponda kurso. Mia instruisto estis Birjukova Larisa. Ŝi tre klare instruis min kaj mi sentis zorgeman rilaton al mi. Sed diversaj ĝardenumaj aferoj kaj atakoj flanke de mia edzino pri rapida konstruado de la ĝardeno domo (por ne perdi monon pro galopanta inflacio) ne permesis al mi plu okupiĝi pri E-to kaj mi, preskaŭ plorante lasis ĝin....

Mi aktivas kiel amatora kanzonisto, poeto kaj muzikisto en la loka literatura societo kaj koruso de rusa kaj ukraina popola kanto.

Scii Esperanton mi deziras por disvastigo de la poetika kaj muzika mia kreado sen pligrandigo de mia populareco publika...

kun estimo,

veterano de la 2-a Mondmilito Djakov Viktor Iliĉ.

Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco

{N.Neksin}

AFO[☹]RISMO[☺]J

kolektis kaj esperantigis
Stanislav Kacko
[KURGAN, Ruslando]

*Dum unu hoze de ludo pri
homo eblas ekscii pli, ol
dum jazo de interparolo*
{Platon}

*La plej bona zimedo
antaŭdizi estontecon estas
faziĝi kzeinto de ĝi*
{Piter F.Druker}

*Pli bonas, ke vin konas nur
6 homoj el tiuj, pri kiuj vi
povas fieri, ol 60 miloj el
tiuj, kiujn vi hontas*
{Albert Bruks}

esperantigis
Igorj Belousov
[NADIM, Ruslando]

*Talento estas tio, kion vi
fazis, sed ne tio, kion vi volis*
{aktorino Ludmila Gudĉenko}

*Ne timu malamikojn: en
ekstrema okazo ili povas
mortigi vin*

*Ne timu amikojn: en
ekstrema okazo ili povas
perfidigi vin*

*Sed timu indiŝerentulojn.
Ili ne mortigas kaj ne per-
fidas, sed laŭ ilia senvorta
konsento okazas sur la Tero
ĉiuj perfidoj kaj mortigoj.*

{Al kiu apartenas tiu ĉi aforismo?}

kolektis kaj esperantigis
Irinau Ŝuŝunova
[VOLGOGRAD, Ruslando]

*La plej saĝaj libroj
estas infanaj ĵabeloj.*
{el la kolekto de
“Argumentoj kaj faktoj”}

*Prunteprenu ĉe vi mem kaj
tiel reduktu viajn elspezojn.*
{Sokrato}

*Ĝibulo ne ekvidos viajn
vezukojn, se vi ne zimarkos
liajn ĝibojn*
{Orienta saĝo}

*Poz ĵazi bonan ĵotelon oni
devas kompzeni kaj estimi
homan postaĵon.*
{el periodaĵoj}



Jurij Perevalov
[LESNOJ, Ruslando]



Nina Vinnikova
[NOVOALTAJSK, Ruslando]

Rudolf Zoldoŝ,
[KANJIZA, Jugoslavio]

PROVERBOJ

*El popola cerbo
venas la proverbo*

*Kiam sako mizeras
- amo malaperas*

*Amo supermezura
ne estas tze plezura*

*Ne doloras ĵrapo
sur ĵremda kapo*

*Ĉe botisto la ŝuo
ĉiam estas kun tzuo.*

*Bela vizaĝo sen
multa saĝo*

*Poz kapti ezokon
bon-gustigu la hokon*

"Mi sendas al vi de mia lernanto de duagrada publika lernejo tekston, kiun mi tradukis por entuziasmigi la klason pri Esperanto. Se ĝi plaĉos al vi, bonvolu publikigi ĝin laŭeble. Mi antaŭdankas vin."

Agrimaldo S. Souza

Esperantigis

Evandro de Freitas

[VALENCA, Brazilo]

Poemo, verkita okaze de 500 jaroj
de la portugala malkovro de Brazilo
la 22-an de aprilo 1500

JUNA BRAZIL'

Olo, juna Brazil' ...

Portanta memoraĵojn kaj lokojn malkonatajn,
Riĉas je fruktodono kaj abundo.
Malgraŭ la malriĉeco de iuj kaj gajnavideco de aliaj,
Vi ankoraŭ havas multe da amikoj.

Mastro de festoj kaj eŭforioj,
Multfoje mi provis priskribi tian magion.
Rigidiĝinte en ideoj, mi apenaŭ perceptis,
ke tiu tero estas ĉio, kion mi plej aspiris.

Vi akceptemas rasojn kaj ties belaĵojn
Estas nekvieta koro el "gigantoj",
Pulmoj elradiantaj verdojn,
Tamen, oni malgrandigas viajn grandecojn.

Juna, juna Brazil', vi estas bela
Malĝojas kaj suferas,
Toleras malfeliĉojn kaj provas kaŝi vian doloron:
Jen la mispaŝo, la trompiĝo.



Maŝa Terjoĥina, [ULJANOVSK, Ruslando]

La supra desegnaĵo **Nina Vinnikova**
[NOVOALTAJSK, Ruslando]

Kiu kapablas deĉifri la belecon de Brazil',
De tiu Rio de Janejro, kiu min akceptas elkore,
De tiu karnavalo februara, kiu nin vekas
Kaj nin forgesigas pri malordo?

Bahia kaj nordoriento*:
Kiaj teroj "libera" kaj malsana,
Kiu ĝojigas kaj penigas siajn gentojn
Kaj ĉielas tiel bele kaj lazure.

Kaj por vi, kio estas 500 jaroj?
Poluita aero kaj malkonsidero,
Mirinda maro makulita.
Kion oni diros poŝt 500 jariaj?

** Bahia kaj nordoriento: unu el la ŝtatoj de la nordoriento de Brazilo. Bahia famas pro siaj naturaj belecoj kaj karnavaloj. Nordoriento suferas pro sekeco kaj akvomanko.

Poemo de **Manoel Ramos Nogueira** [TORRES, Brazilo]

"Mi dankas vin pro la sendaĵo de la gazeto KOMENCANTO, kiu donas oportunecon al novaj esperantistoj "komencantoj" por kunlabori, sendante siajn artikolojn por publikigo... Profitante tian oportunecon mi sendas al vi poezion de mia verko por "Komencanto". Nur tiel ni diver-

VI ESTAS BELA

sigas la verdan stelon tra la mondo. Tiu poezio estis verkita antaŭ ol mi eklernis Esperanton, kaj esperantiĝis ĝin nia samideano Ivo Sanguinetti. Fakte mi ne nur estas komencanto, sed verdire, mi estas lernanto."

Esperantigis **Ivo Sanguinetti** [TORRES, Brazilo]

Kion fari?

- Kion fari pri la vivo krom vivi?
- Kion fari pri la rideto, krom rideti?
- Kion fari pri la espero, krom sonĝi je ĝi?
- Kion fari pro la doloro, krom kuraci ĝin?
- Kion fari pri la sentoj, krom fidi je ili?
- Kion fari pri la tago, krom vekiĝi kaj realigi?
- Kion fari pri la malbonecoj, krom forpeli ilin?
- Kion fari pri la nokto, krom dormi kaj sonĝi?
- Kion fari pri la vojo, krom piediri sur ĝi kaj sekvi ĝin?
- Kion fari pri la amikecoj, krom kultivi ilin ĉiutage?
- Kion fari pri la boneco, krom esti ĝia eterna partnero?
- Kion fari pri hodiaŭ, krom klopodi ne vivi senrezulte?
- Kion fari pri la estonto, krom atendi ĝin trankvile kaj fidè?
- Kion fari pri la digno, krom esti digna kiel ĝi?
- Kion fari pri la simpleco, krom agi grandece?
- Kion fari pri karesa gesto, krom balzamo por la vivo?
- Kion fari pri la atendado, krom uzi ĝin kiel ilo de saĝeco kaj kontrolo?
- Kion fari pri la irado, krom aventura kampo por eltrovoj kaj serĉesploro?
- Kion fari pri la reveno, krom granda libro kun la respondoj de tio, kio oni serĉis dum la irado?
- Kion fari pri la morto, krom morti por vivi ĝin ?





Jurij Perevalov
[LESNOJ, Ruslando]

Bill Thorne, [LONDONO, Britio]

KLUBO de RAJDISTOJ

Dum la vivo de Zamenhoff aperis fruaj bicikloj, ankaŭ kluboj de rajdistoj (biciklaj). Kiam tia klubo alproksimiĝis al iu vilaĝo, la estro sonis en la etan arĝentan trumpeton por homoj povus vidi ilin trapasi, kaj eble saluti. Tamen. Ofte okazis, ke iu knabo-huligano ĵetadis sian ĉapon en la grandan radon de biciklo, kaj ĝi ŝtopiĝis en la forko, kaj la rajdisto faliĝis super la maŝino, en la vojon.



Pensante pri la malfeliĉoj de aliuloj, ni forgesas la niajn

Limerike

Aĉetu biciklojn, sinjoroj,
Moviĝos vi kiel leporoj,
Muskoloj fortiĝas,
Humoro altiĝas,
Vi celon atingos en gloro!


(NA)

BICIKLO
MOVIĜAS JE 10 kph

RADO
TURNAS
KAJ
ANTAŬAS

ĈI PUNKTO
NE MOVAS
ALIE ĜI RADŬUUS

DO PARTOJ DE RADO MOVIĜAS SENDENDE.



PLI LONGAT
PEDALDT POR
LEVPOVD!

APLIKATA SCIENCO



MI PUŜAS PER MANOJ



MI DAŬRAS PUŜI PER MANOJ —
NE BEZONAS PEDALI — ĈU?

Pri l'gloro de l'celo

La bona biciklo konsistas el radoj, kiuj tre vige ruliĝas sur padoj, al kiuj aliĝas pedaloj kaj framo kun forko, stirilo, pumpilo kaj selo, sur kies surfaco veturas postajoj de gesinjoroj (kaj gekamaradoj), kun granda plezuro sur freŝa aero rajdas pensante: pri sia prefero, pri domo, kameno, nobela fiero, pri bona vetero sur blua ĉielo, pli bona botelo kaŝita en kelo, kaj la konsidero pri l'gloro de l'celo...

(NA)

Aŭgusto Monteroso [Argentino]

Esperantigis

Yunier Cables Solis [HOLGVIN, Kubo]

La Nigra Ŝafino

FABLO

En malproksima lando vivis Nigra Ŝafino, sed estis mortpafita.

Post unu jarcento la ŝafaro pentigita starigis al la Nigra Ŝafino ŝtonan monumenton, kiu bele staris en la parko.

Tial sekve, kiam aperas Nigra Ŝafino, oni ĝin baldaŭ mortigas.

Por ke la estontaj generacioj de Nigraj Ŝafinoj povu ekzerciĝi en la skulptaĵo.



Maŝa Terjoĥina
[ULJANOVSK, Ruslando]

Trovis kaj sendis al la redakcio **Rudolf Zoldoŝ**, [KANJIZA, Jugoslavio]


R. Zoldoŝ debutas ĉi-numere sur kelkaj paĝoj kaj temoj. El lia letero:

“Mi ricevis vian leteron kaj komprenis ĉion, kion vi skribis al mi, - sed ni jam tamen estas tre malpaciencaj, ĉar pli ol 10 jaroj daŭras situacio en nia lando kaj ni ankoraŭ neniel vidas plibonigon en venonto. Nu, mi deziris tiel fari, kiel vi proponis kaj komencis iajn E-ajojn skribi kaj nun sendas al vi. Mi tradukis iomete el la hungara kaj serbo-kroata lingvoj iajn ŝercojn kaj ankaŭ el mia iama Lernolibro mi uzis kelkajn proverbojn, fabeletojn ktp.”

La populareco de la Elefanto

En iu tago la sovaĝbestoj de la ĝangalo diskutis pri la populareco de la Elefanto. Ĉiuj agnoskis, ke la Elefanto estas la plej populara inter ili, sed neniu el ili povis trovi la kaŭzon de tiu ĝenerala ŝato.

Jen la diskuto:



Ĝirafo: Se la Elefanto havus tiel longan kolon, kiel mi, — la populareco estus komprenebla. — Li estus la plej alta inter la bestoj.

Pavo: Se la Elefanto havus tiel pompan koloran voston, kiel mia vostplumaro, li estus la plej bela en la ĝangalo.

Leporo: Se la Elefanto povus tiel rapide kuri, kiel mi, — li estus la plej rapida el ni kaj la populareco estus tuj komprenebla.

Urso: Se la Elefanto estus tiel forta, kiel mi, - li estus la plej forta en la arbaro.

Subite aperis la Elefanto mem. Li estis pli forta, pli granda ol ĉiu el la bestoj, sed ankaŭ pli kvieta, pli modesta. Jen, tio, - antaŭ ĉio estis vera kaŭzo de lia populareco.

Ni atendas viajn kontribuojn pri la temo:

Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?

Kolektis kaj esperantigis **Margarita Zujeva**, [MOSKVO, Ruslando]

Neputzitaj Pensoj

Ĉarmo de juneco rapide ĉesis, ĉarmo de matureco restas kun ni por ĉiam

{Menandr}

Kun malnovaj amikoj laŭ la novaj vojoj, sed ne kun novaj amikoj laŭ antaŭaj vojoj

Kiu nenien flosas, por tiu ne ekzistas favora vento

Se homo perdis monon - li perdis nenion
se li perdis amikojn - li perdis duonon
se li perdis esperon - li perdis ĉion

Estas malriĉa ne tiu, kiu havas malmulte, sed tiu, al kiu ne sufiĉas


Nur kredo estas senkosta, sed senkostaj perfidoj ne ekzistas

{Hezzen}

LITER - SUPO

Yonier Cables Solis [HOLGVIN, Kubo]

"Danikon pro la vica KOMENCANTO. Mi sendas kontribuojn por nia gazeto."
Oni devas trovi kvin vortojn vertikale aŭ horizontale:



El la tero kreskas bero

Stanislav Kacko
[KURGAN, Ruslando]

Mi ricevis la vican numeron de "K" kaj mi volas diri, ke "K"-5 estas tre interesa. Precipe al mi plaĉas ludo "El la tero kreskas bero".

Stanislav bone solvis niajn ĉenojn:

marko	kolo
marto	koro
morto	moro
moŝto	mono
poŝto	kono
	komo
	domo
	doko
	diko
	piko
kafo	pino
kaso	kinco
tasoo	fino



Kaj miaj vort-ĉenoj la plej longaj: ⇨⇨⇨⇨⇨
kaj la plej kurtaj: ↓

iu	oro
ia	aro
ja	amo

Thomas Alexander
[ROĈESTER, USA]

Jen solvo

al unu	kolo
el la	koto
vort-ĉenoj...	kato
iom pli mallong- ga o!	rato
mi atendis	rano
	lano
	lago
	ligo
	figo
	fino

- LUDO
- lumoo
- sumoo
- sunoo
- sano
- mano
- majo
- maroo
- miro
- muro
- turo
- teroo
- beroo
- benoo
- beni
- teni
- peni
- peti
- meti
- veti
- veki
- peki
- peko
- peto
- reto
- reĝoo
- ruĝoo
- luĝoo
- lupo
- lipo
- pipoo
- pinoo
- panoo
- pato
- kato
- koto
- boto
- bato
- dato
- doto
- domoo
- pomoo
- povoo
- movoo
- monoo
- minoo
- linoo
- lunoo
- LUDO



Margarita Zujeva

[MOSKVO, Ruslando]

— Kial vi jam la trian fojon celas ŝteli ĝuste el nia vendejo?

— Mi ŝatas vian vendejon, ĉar ĉi tie estas tre malaltaj prezoj.

— Sinjoro policisto, oni ŝtelis de mi la perlan kolieron!

— Kiel ĝi aspektis?

— Kiel aŭtentika.

— Kial vi provis fuĝi el prizono?

— Mi volis edziĝi.

— Strange vi tamen komprenas liberecon!

— Mia patro petas vin ŝanĝi je pli malgrandaj moneroj 50 rublojn.

— Bone, kie estas tiuj 50 rubloj?

— La patro diris, ke li alportos ilin al vi postmorgaŭ.

Jurij Rumajncev

[ZARJEĈNIJ, Ruslando]

La unua piloto al la dua:

— Diru al la paraŝutistoj, ke ili ĉesu salti. Ni dume ne ekflugis.



Rudolf Zoldoŝ [KANJIZA, Jugoslavio]

Kiu scias, ĝis kiam restis Adamo kaj Eva en Paradizo?

— Ĝis aŭtuno, - estis la respondo.

— Kiel vi tiel pansas?

— Ĉar ĝis tiam restas maturiĝintaj pomo-fruktoj.

En tribunalo:

— Dudek jaroj da mallibero, - ordonas la ĉefjuĝisto.

— Sed mi aĝas 75 jaroj! - plendas la akuzito

— Nu, tiam, amiko mia, kiom vi ekpovos...

En la kuirlernejo

— Dum kiom da minutoj kuirigas ovojn?

— Dum naŭ minutoj, - estis la respondo

— Sed vi diris antaŭe, ke sufiĉas tri minutoj?

— Nu, jes, sed estis tri ovoj...

Infano en urbo

Acidiĝis la lakto. Malgranda Matiaso diras: estas neniam miraklo, ĉar la kamparanoj tut-tage restigas bovinojn sur kampoj sub la varmega sunlumo...

— Vi plie rekomendas edziĝi je la patrino, ol je la filino?

— Nu, jes. Ĉar se vi edziĝos je la filino, vi ricevos terure aĉan bopatrinon!

— Sinjoro kuracisto, mia edzo traktas sin kiel fluganta telero...

— Sendu lin al mi.

— Bone, sed kie li povos alteriĝi?



Ankaŭ mi estas uzala esperantisto!

Valerij Ĥabarov

[GORJAĈIJ KLUĈ, Krasnodarskij kr., Ruslando]

KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Pagintaj abonantoj de "K" - senpage

Jurij Rumjancev
libroj kaj filmoj pri
sciencfikcio kaj "teruro"
Kurĉatova, 41-85
ZARECHNY
Sverdlovska reg.
624250
RUSLANDO

Afshin Rusouli
26 ja., universitata
studento; pri ĉiuj temoj
tutmonde
14 Homayune Lane,
Sh. Rajai Str., 69156,
BURUJERD
IRANO

S-ino Xie Yuzhen,
42 jara ĉina esperantistino,
sana kaj bonkora volas
edziniĝi al eŭropa viro malpli
ol 60 jara
Huanshi-Zhong-lu
Nankeng-dong 6-403,
CN-510060, GUANGZHOU
ĈINIO

*f-ino Hilda Martha
Gonzalez Gomez*
10-jara knabino ŝatas kor.tm. pri
ĉio interesa, ŝatas pupteatron
Calle 19, No 59, Entre 25
y 8, Reparto Sanfield,
CU-80400, HOLGUIN,
KUBO

LETER-VESPERO
por gaje paŝi en la
novan jarmilon!

Bonvolu sendi al ni be-
lan bildkarton el via lan-
do ĝis fino de novem-
bro. Ĉiu sendinto rice-
vos E-bildkarton de nia
urbo, kaj ni balote elek-
tos unu por invito al
senpage semajno en
nia urbo.

Anna Pistorova
Nove nam. 1746,
CZ-560-02
CESKA TREBOVA
ĈEĤIO

*Saulo Zacarias
Saraiva da Silva*
komencanto, deziras
korespondi tutmonde
Rua Espirito Santo,
1414/103, BR-36016-200
JUIZ DE FORA, MG,
BRAZILIO

s-ro Lila Baniya
30 ja., poŝtisto,
muziko, vojaĝoj,
lingvoj
GPO Box 12326,
KATHMANDU
NEPALO

s-ino Lenke Szasz
52 jara lingvoinstruistino
dez.kor. kun samaĝulino.
Ŝatas legi, traduki; revuojn.
Guarii nr. 130, bloc.
Et. 11, ap 7, RO-+174,
Praid, jud, HARGHITA,
RUMANIO

f-ino Tania Šapel
16 ja., volas korespondi kun
gejunuloj 16-20 jaraj tm,
ŝatas sporti kaj danci.
Lentupio 24,
LT-4730,
SVENEIONIJS,
LITOVIO

Dmitrij Varlamov
12 jara knabo int. pri
moneroj, kalendaroj,
vojaĝoj ka temoj
Diksona 31-1,
KRASNOJARSK,
RU-660020
RUSLANDO

Grupo de skoltoj
komencantoj, serĉas
korespondantojn tutmonde
Grupo Escoteiro 19, DF
Colegio Militar SGAN
902/904, BR-70790-025
BRASILIA (DF),
BRAZILIO

**Japana
Esperanto
Korespondo
Servo**

ĉiam konstante akcep-
tas korespondo-propo-
nojn kun japanoj.
Skribu unuope al:

*Japana Esperanto-
Korespondo-Servo;*
ĉe KLEG,
Sone-higasi 1-11-46-204,
TOYONAKA-SI,
561-0802
JAPANIO

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



**Via abono por
via kaj nia bono!**

2000 = KOMENCANTO = 2001
kostas same!

